P U R A J   P U L M O J   2025:1
Organo de TADEN, Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj
Prezidanto: Jan Bemelmans: jan.bemelmans2@gmail.com
Sekr., Kas., Red.: Rob Moerbeek: robmoerbk@proton.me (nova!)

La jarkotizo por A-landoj estas 5 eŭroj, por B-landoj 3,50. UEA-konto tade-t.
…......................................................................................................................................

La Monda Nefumtago: 31 majo 2025.

MOS, la Monda Orgnizaĵo pri Sano, proklamis kiel temon por hodiaŭ:
**“Senmaskigi la allogadon: senmaskigi la taktikon de la tabak- kaj nikotinindustrio.”**

Por ĉi tiu numero ni havos du temojn krom la kotiza avido de la kasisto:
Francio progresas kaj nederlanda ekonomo esploris nikotinefikon al la cerbo.
Ĝenerale en Nederlando reaperis cigaredstumpoj sur trotuaroj, vaporantaj junuloj eĉ en stacidomo, sed monkolektante por la Pulma Fonduso mi trovis koran donacemon.
Konsultante PIV mi ekkonscis mian lingvan pekon: “vaporumi” rilatas al kuirado de ansero, do iom skeptikigas pri la uzo de e-cigaredoj. Sufiĉas kompari fumo-fumi.
Sed ni komencu pri Francio:
La franca sanministrino Catherine Vautrin deklaris ĉiujn lokojn kie ĉeestas infanoj fumliberaj: plaĝoj, parkoj, arbaroj, sport-kompleksoj estos tabuaj por fumantoj. Kiu ekde 1 julio malobservas la regulon, riskas monpunon de 135 eŭroj. Tio ne rilatas la e-cigaredojn, pri kiuj Vautrin konsultos sciencistojn kaj disponos ene de unu jaro.
La motivo por la nova leĝo estas ke jare fru-mortas 75 000 fumantoj pro tabakrilataj malsanoj: kancero, kor- kaj angiaj afekcioj. Ili ankaŭ perdigas 156 miliardojn da eŭroj pro sanzorgo, preventaj disponoj kaj perdita produktopovo.
Jam reduktiĝas la nombro de fumantoj en Francio: 23% (memdeklare), el 17-jaruloj nur 16% (en 2017 ankoraŭ 25%).
Ankaŭ 60 ghis 80% el la loĝantaro apogas fummalpermeson, konsidere la sanriskon de pasivaj kunfumantoj, kiel infanoj. En 2035 eku generacio de nefumantoj

Nederlandan ekonomon, laŭ scienca aldono en NRC (Nova Roterdama Ĵurnalo) konsternis pluraj forpasoj de 50- ĝis 60+jaraj konatoj. Oni avertadis ilin, sed ili – kiel Zamenhof – ne povis liberiĝi. Plej emociis lin la vaporemo de infanoj, eĉ 12-jaraj. Do ĉar studoj pri la efiko de nikotino rilatas korajn, angiajn kaj pulmajn malsanojn, sed ne la cerbon, H.Stam ekis studi neŭrofiziologion. Evidentiĝis, ke nikotino malpliigas la reagon al erarsignaloj en la cerbo. Elektro-encefalogramoj montris, ke la sinusoj/kontraŭsinusoj ĉe fumantoj multe malpli altiĝas ol ĉe nefumantoj. Prov-uloj ricevis instrukcion elekti longperspektivan estontecon rekte kontraŭ sia deziro, do kun cerba erarsignalo. Evidente la daŭra reprovizado per dopamino (plezuriga hormono) malakutigas la reagemon ĉe nikotin-uzantoj. Rezultas, ke oni malpli inklinas korekti sian konduton. Multaj bezonas helpon. FINO.